

## ĈEA-retkomunikoj 6/2008

CxEa-retkomunikoj estas neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio sendata al cxiuj rete atingeblaj membroj de CxEa sed ankaux al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Cxehxio. Gxi neniam enhavas aldonajxojn. Se vi tamen ne volas ricevadi gxin, sufcixas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

### ENHAVO:

1. Nova konsisto de la redaktokonsilio
2. Unicode kaj x-konvencio
3. CxEa-retkomunikoj dissendotaj ankaux en 2009
4. Cxehxa Esperanto-junularo aktivas
5. Kalendaro de Esperanto-eventoj en Cxehxio
6. Bondeziroj

### 1. NOVA KONSISTO DE LA REDAKTOKONSILIO:

Kiel vi jam scias de la pasintaj CxEa-retkomunikoj kaj pli amplekse de la CxEa-organo Starto, ekfunkciis nova skipo de funkciuloj ene de CxEa, kio influas ankaux la konsiston de la CxEa-redaktokonsilio. Gxin nun kreas: Komitatoj de CxEa (Pavla Dvořáková, Libuše Hýblová, Petro Chrdle, Miroslav Malovec, Jana Melichárková, Pavel Polnický kaj Jiří Tomeček), prezidantino de CxEa-kontrolgrupo (Libuše Dvořáková), prezidanto de CxEJ (Marek Blahuš) kaj retejestro de [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) (Aleš Tomeček). La ekesto de la retkomunikoj: La redaktoro ([chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)) kolektas kontribuojn kaj lauxbezone (do neregule) kompilas novan numeron kaj dissendas gxin unuafoje kompletig-cele kaj rimark-cele al la supre nomita redaktokonsilio, kiu havas laux la aktualeco de la informoj unu gxis tri tagojn por resendo de la teksto kun intervenoj. Nur post tiam la retkomunikoj estas dissendataj al la abonantoj.

### 2. UNICODE kaj X-KONVENCIO

Mi (la redaktoro) multe pli volente uzadus belan Esperanto-alfabeton, kiu ekde la elrego de la kodigo Unicode (UFT-8) ne estas teknika problemo. Bedauxrinde laux miaj spertoj ankoraux estas kelkaj esperantistoj, kiuj havas kun la akcepto de unikodaj tekstoj problemojn kaj anstataux la supersignitaj literoj aperus sur iliaj ekranoj enigmoj. Pro tio mi plu uzadas la x-konvencion kiel provizoran teknikan solvon. Tamen, mi jam nun provas, cxu mi ne subtaksas la abonantojn de la retkomunikoj:

ĉ, Ĉ, ĝ, Ĝ, ĥ, Ĥ, ĵ, Ĵ, ŝ,Ŝ, ŭ, Ŭ.

Se vi en la supra linio vidas anstataux belajn literojn kun Esperantaj supersignoj ion nekompreneblan, bv. skribi al [cxea@blahus.cz](mailto:cxea@blahus.cz), menciante, kian posxtilon (Outlook Express, Mozilla Thunderbird, ...) kaj kian operacian sistemon (Windows XP, Windows 95, ...) vi uzas, kaj Marek Blahuš klopodos konsili al vi, kiel sxangxi la agordon de via komputilo, ke ankaux vi povu legi bele en Esperanto. Se tio ne eblos, ni

restos cxe x-konvencio ankoraux ian tempon, sed mi tre gxojus, se tio ne plu necesus.

### 3. CxEA-RETKOMUNIKOJ PLU DISSENDOTAJ ANKAUX EN 2009

En la numero 4/2008 estis anonco, ke ekde la jaro 2009 la CxEA-retkomunikoj estos dissendataj novmaniere: ke ili estos lokitaj sur la pagxon [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) kaj cxiuj abonantoj ricevos nur sciigon pri la ekapero de cxiu nova numero. Tamen, post tio venis pluraj deziresprimoj, ke ni konservu la gxisnunan dissendadon de kompletaj tekstoj, kiu pli igas onin vere legi (kaj do atenti) la enhavon. Cxar en la historio de CxEA-retkomunikoj venis ecx ne unu retmesagxo kun la deziro de forvisxo de lia aux sxia retadreso de la dissendolisto, la redaktokonsilio do decidigxis konservi la gxisnunan sistemon.

### 4. CxEHxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS (oficiala organo de CxEJ redaktata de Marek Blahuš)

Cxehxa Esperanto-Junularo (CxEJ) pretigxas por festi la novjaron en du internaciaj renkontigxoj - Internacia Seminario en Germanio (Biedenkopf) kaj Ago-Semajno en Slovakio (Liptovský Mikuláš). La IS-n cxeestos 5 membroj, la AS-n 2 membroj. Dum ambaux arangxoj eblos aligxi al la 65-a IJK okazonta julie en Liberec. Por ties partoprenantoj oni ankaux arangxos karavanon al la tujsekva 94-a UK en Bjalistoko. Gxin jam planas partopreni 4 CxEJ-anoj.

Marek BLAHUŠ dum sia studo en Belgio cxeestis plurajn e-arangxojn, renkontigxis en Bruselo kun eksestraranino Vladimíra CHVÁTALOVÁ, kaj cxe la Katolika universitato de Loveno fininstruis kurson de esperanto al kvin studentoj kaj okazigis prezenton pri la lingvo kadre de kurso pri multlingvismo. Li revenos el siaj studoj la 12-an de februaro 2009.

Unuan semestron de la elektebla universitata studobjekto Esperanto, instruata de Josef VOJÁČEK, decembre sukcese finis en Brno 41 kaj en Olomouc 12 studentoj, el kiuj kelkaj jam eniris en kontakton kun CxEJ.

Cxehxa Esperanto-Junularo deziras al cxiuj legantoj gajan kristnaskon kaj invitas al vizito de sia retpagxaro cxe <http://cej.esperanto.cz/>

### 5. KALENDARO DE ESPERANTO-EVENTOJ EN CxEHxIO

En la kalendaro estas envicigitaj nur la eventoj, kiuj okazos en Cxehxio, aux kiuj estas organizataj el Cxehxio. Eksterlandajn eventojn vi sercxu plej bone cxe <http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>.

7.2.2009: Renkontigxo omagxe al centjariĝo de Klubo esperantista en Prostějov. Info: [dundeejarek@seznam.cz](mailto:dundeejarek@seznam.cz)

28.2.2009: Esperanto-renkontigxo en Svitavy: gvidata vizito de Esperanto-muzeo, filmo kaj rakonto de la vizito de mezorientaj landoj. Info: [dvor.libuse@seznam.cz](mailto:dvor.libuse@seznam.cz)

3.-5.4.2009 La 4-a Sabla Printempo en Písek (kunlabore kun [E@I](mailto:E@I), praktika seminario "Esperanto kaj Interreto" por komencantoj kaj progresintoj). Info: [esperanto.pisek@seznam.cz](mailto:esperanto.pisek@seznam.cz).

14.-19.4.2009: Printempa lingva seminario de AEH en la pensiono ESPERO en Skokovy.  
Info: [nechvilep@seznam.cz](mailto:nechvilep@seznam.cz)

23.5.2009: Tradicia Infana Tago en Svitavy. Info: [dvor.libuse@seznam.cz](mailto:dvor.libuse@seznam.cz)

13.6.2009: Renkontigxo en la regiono de la regxo Ječmínek, kastelo Chropyně,  
info: [tonda.krejcir@seznam.cz](mailto:tonda.krejcir@seznam.cz)

3.-5.7.2009: Internacia renkontigxo omagxe al la centa datreveno de la fondigxo de Esperanto-klubo de doktoro Schulhof kun jarkunveno de AEH-IKEH en Pardubice. Info: [aeh-ikeh@volny.cz](mailto:aeh-ikeh@volny.cz)

5.7.-18.7.2009, 19.7.-1.8.2009, 2.8.- 15.8.2009: tri etapoj de Somera Esperanto-Tendaro en Lancxov. Info:  
[www.set-lancov.cz](http://www.set-lancov.cz) aux [info@lancov.cz](mailto:info@lancov.cz)

18.-25.7.2009: 65-a Internacia Junulara Kongreso kun la temo "Liberec",  
Liberec, Inf.: [ijk@esperanto.cz](mailto:ijk@esperanto.cz) <http://ijk.esperanto.cz/>

25.7.-1.8.: Universala Esperanto-Kongreso en Bjalystok (PL). Informojn pri la buskaravano organizata de AEH  
(restas ankoraux kelkaj liberaj lokoj): [josef-hron@volny.cz](mailto:josef-hron@volny.cz)

22.-29.8.2009: EKOTUR - Tradicia internacia ekoturisma renkontigxo por biciklantoj kaj piedturistoj.  
Svitavy-regiono, info: [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

9.-11.10.2009: Konferenco de Cxehxa Esperanto-Asocio en Svitavy, kun gvidata vizito de Esperanto-Muzeo. Info: [tomecek@esperanto.cz](mailto:tomecek@esperanto.cz)

12.-18.10.2009: InPaSem - Internacia Paroliga Semajno. Kurso por komencintoj kaj seminarioj por jamaj parolantoj. Dobřichovice.  
Info: [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

7.-14.11.2009: Terminologia Seminario en Dobřichovice. 1. Kurso prigrxenerala terminologio kaj

gxia apliko al Esperanto, sub la gvido, krom aliaj, de Jan Werner, (auxtoro de la verkoj "Terminologia kurso" kaj "Terminologiaj konsideroj"). 2. Diskuto pri spertoj de la partoprenantoj en kreado de mankantaj terminoj dum verkado de fakaj tekstoj. Info: [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

12.12.2009 AnkRo (Antauxkristnaska renkontigxo) en Písek, cxi-foje omagxe al la 150igxo de D-ro Zamenhof. Info: [esperanto.pisek@seznam.cz](mailto:esperanto.pisek@seznam.cz)  
<<mailto:esperanto.pisek@seznam.cz>>

10.-25.7.2010: Flugkaravano al Kubo (UK en Havana kun turisma ekkona antauxkongreso). Info: [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

Cxu vi ne trovis vian arangxon cxi tie? Ne kulpigu nin, sed vin mem kaj sendu la informojn al la redaktanto de CxEA-retkomunikoj [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

## 6. BONDEZIROJ:

Mi finas cxi-lastajn CxEA-komunikojn de la jaro 2008 dezirante al vi cxiuj agrablajn kaj gajajn kristnaskajn kaj jarsxangxajn festotagojn kaj dum la tuta jaro 2009 firman sanon kaj entuziasman engagxigxon en por- kaj per-Esperantaj aktivecoj.

Nome de la tuta pli supre nomita redaktokonsilio: la redaktoro de CxEA-retkomunikoj Petro Chrdle.